# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO



SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

(fondita en 1918)

CENTRA KOMITATO

PREZIDANTO: DOUGLAS MURPHY
7 Constable Road, Ipswich, Anglujo

SEKRETARIO: J.K.HAMMER
Wibautstraat 49 Zaandam Nederlando

KASISTO: DAVID H. WITHEY
21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool 22, Anglujo

ĈEFREDAKTORO: PASTRO H. A. ROSBACH
Folldal, Norvegujo

Karaj amikoj diverslandaj!

Denove mi kuraĝas elsendi numeron de nia revuo - la nunua dum nova jaro. Kaj mi tion faras kun la kora danko al tiuj, kiuj alsendis al mi materialon al nia gazeto. Mi nun disponas pri multaj taŭgaj artikoloj, bildoj, humoraĵoj k.t.p. Sed-kiel mi jam antaŭe skribis: Redaktado devas esti elektado inter taŭgaj artikoloj ktp. Tial mi ankoraŭ ĉiam bonven-salutas abundon da materialo al la Skolta Mondo.

Nia honora prezidanto verkis al tiu ĉi numero poemon. Vi trovos ĝin, ĝuos ĝin. Kaj eble ĝi rememorigas vin pri tio, ke ni bezonas skoltajn kantojn en Esperanto. Skoltoj estas kantemaj, ĉie, kaj ĉiulande ekzistas abundo da skoltaj kantoj kiuj donis plezuron al vi dum multaj vesperoj ĉe la kampfajro. Kial ĝi ne donu plezuron ankaŭ al alilandaj skoltoj - kaj pere de nia gazeto?

Rubriko, kiun ni deziras ĉiam havi, estas tiu pri korespondo. Kiam miaj propraj knaboj rigardas mian poŝtmarkokolekton, kaj precipe kolekton de bele afrankitaj kovertoj, ofte unuatagaj kovertoj, mi ĉiam povas diri: Per Esperanto mi ricevis ĉi ĉion. La korespondado ankoraŭ donas la samajn eblecojn. Nur unu serioza demando: ĉu vi utiligas la eblecojn? Ĉu tiuj, kiuj per La Skolta Mondo petas korespondamikon, ankaŭ trovas lin?

Post ĉiu numero venas al mi leteroj. Kelkaj enhavas laŭdon, kelkaj kritikon, kelkaj admonojn, petojn aŭ konsilojn. Al ĉiuj: Dankon! Mi nun malkaŝu "sekreton" al vi: Estus tute facile doni al vi pli bonan, pli belan, pli riĉenhavan gazeton. Sed tio kostas monon. La kasisto rakontis al mi, ke ĉiu numero nun kostas 550 steloj - t.e. preskaŭ unu stelo por ĉiu ekzemplero. Kaj tio estas nur la preskostoj. Al tio venas poŝtelspezoj! Sed sciu, se ĉiu abonanto abonigus, aŭ mem donacus, ekzempleron al alia skolto, la prezo entute ne kostus multe pli. Kaj ni havus pli por plibonigi la revuon.

Jen mia ĉefa peto al vi ĉiuj: Havigu kelkajn novajn abonantojn!

Kaj jen mi deziras al vi
sukceson kaj ĝojon dum tiu ĉi jaro.

Hans Amund.

Kaj fine mi memorigas pri la limdato: La 10.a de majo.

LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

VOLUMO III, N-ro 16. Unua jarkvarono 66.

## JARRAPORTO 1965.

Dum 1965 ni daŭre plibonigis la funkciadon de nia Ligo. Inter la anoj de la Centra Komitato estis harmonia kunlaboro, kiu ankaŭ influis la aktivecon kaj entuziasmon de la diversaj membroj kaj naciaj sekcioj. C.K. kaj aliaj funkciuloj daŭre diskutis per-letere. Bona helpilo estis la informilo "ĉiam Preta".

Bedaŭrinde la kontakto kun kelkaj naciaj sekcioj restis ne-kontentiga aŭ eĉ mankis. Car tio nur dependas de la koncernaj funkciuloj, ni ne sukcesis ŝanĝi la ĉagrenigan situacion.

Per komunikoj kaj raportoj en la Esp.-gazetaro ni pli vaste ol antaŭe informis pri nia laboro. Tio ĉi donis tre bonajn rezultojn, eĉ komenciĝon de Sekcio en Brazilo. Ni eldonis mod-estan faldfolion 4-lingvan (Germ.,It.,Ned.,Fr.). En 8 landoj eŭropaj kaj 2 transmaraj ĝi estas uzata. Tamen ĝis nun ĝi ne alportis novajn membrojn aŭ abonantojn. Cetere la ekstera prop-agando tute dependas de la Naciaj Sekcioj kaj ties membroj. Krom kelkaj bonege aktivaj sekcioj, tio estis nekontentiga. Belgujo brilis per bonega serio de artikoloj en la skolta gazetaro.

La kolektiva subskribo de la Uno-peticio fiaskis. Laŭ la nun-aj raportoj nur Belgujo ricevis sukceson. Multaj skolt-asocioj strange plenumis la 5-an skoltan leĝon per simpla nerespondo.

La financa situacio restas modesta, kaj malhelpas la evoluon de nia Ligo al pli bona nivelo. Vojaĝe nia Prezidanto kreis relative grandan personan kontakton kun la funkciuloj de la Ligo. Jus alvenis sciigo pri kunveno de F.D. Murphy kun nia N.R. Stan Milligan en Melbourne.

La plej ĝojiga kaj sukcesplena okazo estis la kunveno dum la U.K. en Tokio, bone sukcesinta pro bona japana organizo.

Konkludo:
Montriĝis, ke la laboro por nia Ligo estas fruktedona. Se la membraro estus pli aktiva, ni certe povus progresi. Tamen la entuziasmaj kunlaborantoj tro ofte mankas. Malnovaj membroj ofte eĉ ne kuraĝas eklabori pro la tre malbonaj rezultoj en antaŭaj jaroj. Bonkoraj amikoj pli bone devus kompreni ke pagantaj membroj kaj abonantoj estas absolute necesaj por daŭra laboro.

J.K. Hammer.

---

## LA KONGRESO EN BUDAPESTO.

Ni havas la malĝojigan sciigon:

N E N I U K U N V E N O de S.E.L. okazos.

La tempo por mendi salonon por la jara S.E.L.-kunveno dum la venonta Universala Kongreso jam forpasis. Kaj ni ĝis nun ne sukcesis trovi kompetentan gvidanton por tiu kunveno.

La bedaŭrinda rezulto do estas, ke ĉi-jare nia kunveno ne okazos.

---

## U E A

en cirkulero de la 11.a de januaro atentigas pri la daŭrigo de la subskribokolektado al la UNo-peticio.

La "nunaj" rezultoj estas 680.000 individuaj subskriboj, kaj 3.268 kolektivaj, reprezentantaj 58 milionoj da membroj.

Kiel nia jarraporto informas, la peto al skoltaj asocioj kolektive subskribi fiaskis. Multaj el la skoltasocioj eĉ ne respondis al niaj leteroj.


Des pli grave estas, ke ni - la membroj de SEL - mem subskribas kaj kolektas individuajn subskribojn. Se la skoltasocioj ne sufiĉe estimas nian laboron, ke ili respondu al niaj leteroj, ni devas montri per ago, ke la laboro estas estiminda.

---


## T R A D U K A L A B O R O


Post iom da korespondo kun la Nederlanda ĉefskolto, mi pristudas laborprojekton, per kiu eventuale S.E.L. en utila kaj celtrafa maniero povos partopreni en la laborojn de la Monda Skolta Oficejo en Ottawa.

Angla-lingvaj SEL-anoj, kiuj estas pretaj eventuale kunlabori per la traduko de skoltaj tekstoj en Esperanton, bonvolu sin anonci per simpla poŝtkarto kun literoj Tr.L. J.K. Hammer.


K
I
M

# EL KIE ?




El:
DE VERKENNER

# G R A T U L O N !

NIA FONDINTO, Avoto - aŭ A.W. Thomson - ne plu estas knabo, sed jam atingis al la matura aĝo. Tion ni ja scias. Kaj nun ni havas la prezuron anonci:

AVOTO festos sian 70-jaran naskiĝtagon
je la 15.a de marto 1966.

Inter la certe multaj gratulantoj ankaŭ ni, "La Skolta Mondo"

\+ + + + + + +

Lia persona slauto je tiu mejloŝtono "antaŭ ol komenci la finajn tridek jarojn de la vivo" estas:

> Mi ankoraŭ varme interesiĝas pri la progreso de SEL, kaj volus vigle instigi ĉiujn reprezentantojn kaj membrojn, ke ili disvastigu ĝin pogrande en ĉiuj landoj! Estas nepre domaĝe, ke nur du jarojn antaŭ nia 50-jara jubileo, ni havas reprezentantojn en nur 15 landoj! Ek al varbado!

\+ + + + + + +

Kaj nia respondo al tiu "Estu preta!"?

---

Ni korespondu kun

La junaj gelernantoj (proks. 14-jaraj)
de s-ino R.G. WILLS
94 West Riverglen Drive, WORTHINGTON.
Ohio 43085, U.S.A. Volas korespondi kun okc. Eŭropo.

---

Kaj jen la solvo de la emblemoj de la diversaj naciaj skoltasocioj:

Syrio - Tanzanio - Tailando - Tuniso - Norvegujo
Pakistano - Panamo - Paraguaio - Belgujo - Bolivio
Brazilio - Kanado - Gano - Ekvadoro - Peruo
Filipinoj - Koreo - Aŭstralio - Armenaj skoltoj - Argentino
Panama kanal-zono-Danujo-Dominika respubliko - Monako.

Kaj jen nova demando: En kiuj el tiuj landoj laboras SEL?

## La 60-litrujo.

Aŭtune la virinoj pecigis rabarbron kaj manĝsekvinberoj sur la kuireja labortablo. Se oni etendis la manon por kapti frandaĵon el tiu amaso, oni ricevis frapon sur la fingroj.

La vinbalonon ni ankaŭ ne rajtis tuŝi. Ĝi estis purigita per eltiraĵo de junipero kaj per varma sodakvo, ĉar bona rabarbrovino postulas purecon.

La pecamason sur la labortablo Berte enigis en la balonon kune kun fermentilo kaj sukero. Kun fermento-ŝlosilo la ujo estis metata ĉe la forno. Tie ĝi bonfartu en konstanta temperaturo.

La termometron mia frato gardis. Le sciis elkrii, se la temperaturo falis kelkajn gradojn pro virina klaĉado en la enira pordo. Tiam li gluiĝis al la ujo kaj frotis ĝin per lana litotuko.

La postan tagon la sesdeklitro klukis. Mia frato atentis la fermentan ŝloson kun intereso. Kun notlibro en la sino la kalkulis la vezikojn per kvinopaj streketoj. Tiel li observis la evoluon de horo ĝis horo.

Mia patro, kiu inspekte venis, donis al tiu laboro sian plenan benon.

Posttagmeze la ujo ektondris. La vezikoj bolis multope tra la vitra tubo. Mia frato, kiu kuŝis aŭskultante, ekmaltrankviliĝis. Estis vivo en la mosto!

Mia frato pravis - subite la giganto spiregis. Rabarbra kaĉo kaj ŝvelintaj sekvinberoj perforte premis. Post nova vomo la fermenta ŝlos estis sentrua kiel poto.

Ni vokis al Berte.- Ŝi ektimis. Ĉi tie naturfortoj laboras. Siblis kaj zumis, la kunplektitaĵo, kiu kovras la vitran balonon, knaris. De sub la kuirforno sin gratis la hundo. Sed ne nur la hundaĉo maltrankviliĝis. - Nun la sesdeklitrujo decidos!

Berte al mia patro. Kiam li venis en la pordo, la fermenta ŝloso kaj la ŝtopilo ĵetiĝis inter la muroj. El la vitrujo la festtrinko staris kvazaŭ tordita ŝnuro al la plafono. Jen aĵoj kiuj postulas vivspacon, ŝajne!

Rapide mia frato sin miksis en la fermentado. Per la manplato al la ŝtopiltruo li premegis. La rezulto estis ŝokiga. Furioza fermentaĵo dissputis tra la kuirejo. Kun mosto sur la

okulvitroj mia patro intervenis. Li uzis ambaŭ manojn. Ĉifoje la ingrediencoj enfluis en la jaka brakumo kaj sprucis fontane el sub la kolumo. La premo estis jam pli malforta, sed ankoraŭ milionoj da furiozaj fermentaj ĉeloj vivis sentipozeman nomadan vivon en la interno de la vinujego.

Kiam fine la restaĵo ŝaŭmante kaj lacege refalis, mia patro kolereme ekakuzis la sinjorinon Schønberg-Erken (fama norvega verkistino de kuirlibro. Rim. de trad.) La recepto de la virinaĉo devas esti tute senprudenta.

Ĝi ne estis -

Mia frato, kiu kontrolis la recepton, trovis ion, kion ni estis forgesintaj, sur paĝo 112. Kun gutanta montrofingro en la kuirlibro li voĉlegis, dum la hundaĉo sin skuis sur la planko:

"La vinfaranto deprenu dum la fermentego la fermentan ŝloson, por tiel malhelpi perdon de valora kaj ankoraŭ nefermentita mosto!"

(El Aukrust: "Mia frato.")



Han slo opp i
Schønberg-Erken.

## Kiel ni faru Kampkeston?

Kesto ja estas kesto...Kaj kesto estas necesa, sed malfacile uzebla objekto. Se ni devas movi ĝin, ĝi ofte donas malfacilaĵojn, kaj se ni ne tre bone aranĝas la enhavon, multaj aĵoj perdiĝas en malluma profundo.
La modelo, kiun ni nun prezentas al vi, tamen estas kesto kun kelkaj specialaj ecoj.
En la tendaro ĝi povas funkcii kiel ŝranko, kaj ĝin facile portas du - aŭ kvar - personoj.

================================================================

## El Polujo invitas

Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj al Seminario en Torun, str Moniuski 16/20, Polujo.
La seminario okazos 13-17a de aprilo, kaj kostas 150 steloj, kio inkluzivas 12 manĝaĵojn, 4, tranoktojn, ekskurson kaj ĉiujn aranĝojn de la Seminario.
Limdato 15.a de marto 1966. Adreso supre menicata.

================================================================

```
      ++++
      ++++
      ++++
      ++++
      ++++
++++++++++++++++
++++++++++++++++
++++++++++++++++
++++++++++++++++
      ++++
      ++++
      ++++
      ++++
      ++++
      ++++
      ++++
      ++++
```

Jesuo diris al ili: Ankoraŭ mallongan tempon estas la lumo kun vi. Iradu, dum vi havas la lumon, por ke la mallumo ne venu sur vin; ĉar tiu, kiu iradas en mallumo, ne scias, kien li iras. (St. Johano 12.35.)

Taga lumo estas la plej bona donaco kiun homo povas ricevi. Dum ĝi ni ja vidas ĉion! Ni povas vidi, kien ni iras, kaj ni povas vidi la landon, tra kiu ni iras.

Tamen: Ni ne ĉiel havas "tagan lumon". Ni ne konas eĉ ĉi tiun tagon, kaj certe ne la morgaŭan. Kiam temas pri la vivo-vojo ni preskaŭ nenion vidas.

Ĉiu, kiu sidis en aŭtomobilo dum vespero kaj nokto, scias, ke la ŝoforo ne povas vidi ĉion. La lanternoj ne sufiĉas al tio. Sed li vidas la vojon, la vojmontrilojn, la avertajn signojn. Kaj tio sufiĉas - li atingas sian celon.

Tian lumon por la vivovojo la Biblio donas.


Se eĉ sur parto nur de l' voj ĝi lumos,
ĝi gvidu nin ĝis mem en ni plenumos
la vivotaskojn la Sprit' de l' Filo.
Ĉar tiel feliĉigas ĝia brilo.


P-ro

# KAMPKESTO

KIEL NI FARU?

*samtempe ŝranko; facile portebla*







L. Teerling

# La "morsa" kodo en novaj vestoj.





a. por flutisto



b. la spuro de la terura "neĝa homo" el TIBETO

c. la dancisto

Ĉu vi ankoraŭ scias manierojn?




„Ne faru ŝercojn en via raporto!"

El World Scouting

Kion faris la Belga SEL-sekcio en 1965?

Aliloke en la gazeto ni menciis, ke la belga sekcio sola sukcesis havigi subskribojn kolektivajn de la skoltasocioj. Se ne nur tion - la tuta jarraporto montras aktivecon, kaj ni publikas el ĝi kiel instigilo al la aliaj sekcioj.

La membraro kreskis de 18 (1961) 24 (1964) al 32. Trimonata bulteno regule aperas po 250 ekz.
La sekcio konservis la fidon kaj kunlaboron de la intern. komisaro, Philip Tossijn.
Malsukceso estis organizo de internacia skolta tendaro dum esperanto-kongreso en Oostende pentekoste.
Belgaj SEL-anoj kolektis 25 plenajn foliojn da subskriboj de la Uno-peticio, t.e. 500 subskribojn. Krome subskribis, pere de SEL-sekcio la Neŭtralaj geskoltoj (9000 membroj), Flandraj katolikaj skoltoj (35000) Flandraj katolikaj skoltinoj (15000), franclingvaj katolikaj skoltinoj (15000), krom politika partieto Popola Unia (11880) kaj la katolikaj sindikatoj (385.179). Laste sekcia estrarano havigis la subskribon de Victor Leemans, belga senatano kaj prezidanto de la Eŭropa Parlamento.

---

K N A B O.

La KNABO -- de generacio la spiko!
Post pluvo kaj suno -- rikolto!
Sed greno kaj trunko, kaj eĉ la radiko
plej same disvolvas en S K O L T O!

Ankoraŭ ne viro, kaj ne plu infano --
li estas treege valora,
kaj baldaŭ fariĝos li mondcivitano,
kun grava rol' ambasadora.

Do zorge atentu pri liaj bezonoj --
precipe pri bonkaraktero;
ĉar nur per matura homar', sen friponoj,
alvenos homara prospero!

10/1/66

A V O T O.



## Junular-safario.

En Nederlando oni aranĝas de la 15.a de julio ĝis la 1.a de septembro junular-safarion, t.e. junuloj 14-18-jaraj estas invitataj al bicikla vagvojaĝo tra la lando. Oni mem elektas la vojon, sed kondiĉo estas minimume 5 tranoktoj en minimume 3 diversaj kampejoj. Estas konkurso pri taglibroj k.t.p. Aranĝantoj estas la nederlandaj skoltasocioj kune kun aliaj junularorganizoj. Verŝajne ankaŭ eksterlandanoj estas bonvenaj. Rektu demandojn pri tio (esperantlingve!) al "Jeugd-Safari, Zeestraat 76, Den Haag.

Kaj - eble tio estus ideo ankaŭ al SEL en la estonteco?



---

## 2. Internacia Konferenco de Lernejoj

en kiuj Esperanto estas instruata, okazos en Graz, Aŭstrujo, 23-28. de julio 1966. Okazos interesaj kaj gravaj raportoj kaj paroladoj de eminentaj fajuloj, kaj ankaŭ estos distra parto dum la programo, i.a. ekskurson en la "verdan" landon Stirio. La kostoj: Ĝis fino de marto 125 aŭstraj ŝilingoj (=80 steloj) poste 150 aŭ.ŝ. Krome loĝo k.t.p. Adreso: Esperanto-Konferenco, A - 8046, Graz, Aŭstrujo.

---

## 22.a junulara kongreso de TEJO

okazos en Pecs, Hungarujo 23-30 de julio 1966. La kotizo entenas ankaŭ restadkostojn. Ĝis 1.a de aprilo ĝi estas 21 US-dolaroj aŭ egalvaloro por junuloj malpli ol 20-jaraj, 23 al aliaj kaj 25 al nemembroj de TEJO. Poste ĝi altiĝas per 2 dolaroj. Okazos ekskursoj, belarta vespero, balo kun elekto de "Miss Esperanto", Oratora konkurso kaj aliaj konkursoj - entute oni aranĝos ĉiel plaĉan semajnon.
Adreso: TEJO, Pécs 1, pk 114.

## Freedom of Speech (Libereco pri parolado)

Tio estas la titolo de nova propaganda kajero eldonita de la Brita Esperanto-Asocio. Ĝi celas la britajn neesperantistojn, kaj estas la dua parto de nova propaganda kampanjo. La unua parto estas alloga poŝtkarto, disdonebla ekz. Ĉe publikaj bibliotekoj k.c.. La poŝtkarto enhavas kelkajn faktojn pri Esperanto kaj inviton ensendi la karton al la BEA por senpaga alsendo de la libreto. Kompreneble la kajero do estas anglalingva, kaj ĝi resume presentas la faktojn pri Esperanto, ekzemplojn de la lingvo, abocan demandaron, kiu donas respondojn al multaj demandoj, varbilon, mendilon ktp. SEL estas menciita mallonge sub la titolo "Youth"(=junularo) Tre taŭga varbilo por anglalingvanoj.

---

## La Blindulo kaj la Elefanto.

La kvina kajero "Legu kaj Lernu", same majstre multobligita de la eldonisto Derrick P. Faux enhavas du teatraĵojn por junaj esperantistoj. La unua titoliĝas kiel la kajero, la dua portas la nomon "La nigra Rozo". Ambaŭ estas bone kompoziciataj kaj facile ludeblaj de junuloj - ekzemple de skolta patrolo. Tiukaze la knab(in)oj devas ĉiu ludi du rolojn. Preferinde do, ke du patroloj kune ludu.

---

## Kantoj kaj rakontoj.

Ankaŭ tiu, la sesa, kajero el la serio "Legu kaj Lernu" portas la saman stampon de kvalita laboro. Ĝi enhavas 5 kantojn kun plej simplaj muziknotoj. La kantoj plejparte estas ĉenkantoj, kaj venas de la plej diversaj partoj de la globo.
Same la tri rakontoj: "La koturnino" de I.S. Turgenev, ruso, "La saĝa kuiristo, "kiu estas korea popolrakonto, kaj "La rajdo de Iĥabodo" de la Usona Washington Irving.

---

## Anne Frank-domo.

Kiu ne konas la nomon Anne Frank? Kiu ne aŭdis pri la "Postdomo"? Nun oni eldonis esperantlingve memorlibron por tiuj, kiuj vizitas la domon. Vizito tie estas kortuŝa okazaĵo - oni ne iras tra muzeo, oni perceptas la vivon, la mizeron, la timon de la malfeliĉa loĝantaro en la postdomo. Sed la domo intencas esti pli: Instigo kaj kuraĝigo al laboro, al kompreniĝo. Tial vi rivecas tiun memoran libreton. Tial vi mem memoru uzi nian internacian lingvon dum la vizito. Ankaŭ tiel ni helpu al la kompreniĝo.

# S K O L T A  E S P E R A N T I S T A  L I G O

(fondita en 1918)

Fondinto: "Avoto". Kunfondinto J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj: "Avoto", Norman Booth, Kolonelo D.H. Davis, L.J. Van Gulck.

## KONTINENTA KOMISIULO

AMERIKO: S-ro C.S. Otto, 7, Longview Road, Livingston, New Jersey, USONO.

## NACIAJ REPREZENTANTOJ

AŬSTRALIO: S-ro S.H. Milligan, 274, Mont Albert Road, Surrey Hills, E.10, Victoria.
BELGUJO: S-ro Kamiel van Herp, Juul Moretuslei 312, Wilrÿk, Antwerpen.
BRAZILO: (PROVIZORA): S-ro Euclides C. Soares, Av. Almirante Tamandaré 979Belém, Pará.
BRITUJO: S-ro C. Bardsley, 42, Westbourne Street, Oldham,Lancs.
DANLANDO: S-ro Sejer Holgersen, Einarsvej 99, Lyngby, Kopenhago.
HISPANUJO: S-ro Pedro Marqueta, Avenida de Valencia 32, Zaragoza.
ITALUJO: S-ro Pietro Ferrara, Via Leandro Alberti 13, Bologna.
JAPANUJO: S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K., 16, Suehirotyo Kitatu, Osaka.
KANADO: S-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest, Ont.
NEDERLANDO: S-ro J.K. Hammer, Wibautstraat 49, Zaandam.
NORVEGUJO: S-ro H.A. Rosbach, Folldal.
PORTUGALUJO: S-ro J.P. de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3° Dt°, Lisboa I.
SVEDUJO: S-ro Curt Bohman, Fack 7, Högen.
USONO: S-ro Larry A. Greene, Box 141, Stadium Hall, Knoxville, Tenn.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL